


# LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ  
ADMINISTRADO:  
WEST-GRAFTDIJK  
(N.H) NEDERLANDO  
ĜIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:  
NEDERLANDO:  
0,80 GULDENO  
ALIAJ LANDOJ:  
14 FR.FR.; 0,70 DOL; 2,15 V.FR.

FNDV241

## MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

### LA SOLVO DE L'ENIGMO.

Traf, la hundo, aliĝis al la filozofoj. Ĉar venis io mistera en lia vivo, io nekomprenebla, io supernatura.

Kio ĝi povas esti, pro kio la korto de la arbargardistejo ĉi-matene havas tian strangan odoron? Ne la kato, nek iu rato. „Kio do ĝi estas?”

Ekzistas inter hundejo kaj ĉaskampa limo pli da aferoj ol hunda nazo povas kompreni. Tio estis la rezulto de la filozofiaj meditadoj de Traf, rezulto, kiu forrabas de li la tutan animtrankvilecon. Ĝi estas besto, sed nekonata besto, kiu tutalie odoras ol vulpo kaj melo kaj leporo kaj kapreolo kaj apro kaj ankaŭ alie ol erinaco kaj muso kaj sciuro.

Nokte ĝi venas el la porkostalo kaj iras al la tortobudo. Ofte ĝi forrestas tri tagojn, sed la kvaran ĝi ree venas. Iam ĝi forrestis tutan semajnon kaj Traf apenaŭ plu pensis pri ĝi. Sed subite la strateto inter la porkejo kaj la torfejo tiom forte odoris je ĝi, ke Traf kuris kiel frenezulo al kaj reen kaj tiom longe hurlis, gratis kaj bojis, ke la ĉasgardisto demandis, ĉu li estas freneza?

Kiam Traf kun sia mastro estis ekstere sur la ĉaskampoj, li forgesis tiun neklarigeblan misteron; ekstere estis ja ĉiam multaj aferoj por prilari kaj de temp' al tempo ankaŭ io kaptebla. Hodiaŭ vulpo, kiu estis pafita, kaj alian fojon kapreolo, kiun Traf devis prilabori. Tio estis grandaj plezuroj: sekvi la ĉasaĵon kaj salti al ĝia kolo antaŭ ol ĝi falis mortpafita. Dum tia nobla laboro Traf forgesis la tedan kreitaĵon, kiu nokton post nokto vagis sur la korto.

Tamen kiam li alproksimiĝis al la hejmo, la penso pri ĝi tuj enfalis lian kapon. Kaj kiom ajn malsata li estis, kaj kiom ajn bongustan manĝon preparis por li la edzino de la mastro, unue li

iris al la porkejo, metis la nazon inter la tabulojn, gratis, blekis, serĉflaris ĝis al la torfejo, kondukis tie same kiel antaŭ la porkejo kaj fine ŝteliris kun sulkiĝinta frunto kaj pendanta vosto en la domon. Kaj la mastro laŭte ridis kaj diris : „Nia Traf havas la ratrabion. Ni metos kaptilojn!” Kaj la proksiman matenon Traf havis en la buŝo du dikajn ratojn, kiujn li svingis ĉirkaŭ siaj oreloj kaj post tio li flugis ree al la porkejo kaj komencis flari.

Iun vesperon kuŝante sur la aprofelo antaŭ la benko, li subite kuris freneze al la pordo, preskaŭ faligis tie la servistino, kiu enportis la vespermanĝon, kuregis al la korto kaj bojis kaj blekis ĉirkaŭ la torfejo, ĝis kiam venis la servisto kun lanterno kaj enlasis lin. Traf ĉirkaŭkuris en la budo, suprensaltis laŭ la muroj, grimpis sur la torfojn, flaris en ĉiuj anguloj, ĝis kiam li ektusis pro la torfpolvo. Fine li ĉagrene forŝteliris, dum la ĉasgardisto lin tutkore priridis. Dum la vespermanĝado li kuŝis malbonhumora sur sia porkofelo kaj eĉ la mortkrio de la kolbaso, kiun la ĉasgardisto senhauĝigis, ne logis lin al la tablo.

„Priridu min,” li pensis, „kiu ridas laste, plej bone ridas ! Mi bone aŭdis, ke io estis sur la korto, kaj ĝi ne estis kato, nek rato : ĝi estis io, kion mi ankoraŭ ne konas, kion mi ankoraŭ ne mortigis. Kiu scias, ĉu eble ĝi estas danĝera besto, iu besto, kiu intencas formanĝi la porkojn aŭ la torfojn. Mi devas atenti, ke ne okazos malfeliĉo. Mia mastro estas la plej saĝa homo, kiun mi konas, sed kompare al mi li estas sufiĉe malsaĝa kaj krome lia nazo ne estas pli bona ol tiu de aliaj homoj, alie li ne eltenus la fumadon de tiuj aĉaj objektoj, kion mi nepre ne povas toleri, kaj la manĝadon de oranĝoj kaj trinkadon de biero, aferoj, kiuj estas abomenoj al ĉiu delikatsenta nazo!”

Intencante enlitiĝi, la ĉasgardisto rimarkis, ke Traf ankoraŭ volas rigardi la veteron kaj li elirigis lin. Ree komenciĝis la al kaj reen kurado kaj la hurlado kaj kiam la ĉasgardisto sin klinis por rigardi, kial la hundo ĉiam gratas la torfejon, Traf suprensaltis al li, blekis kiom eble plej laŭte kaj kondukis, kvazaŭ la bonfarto de la tuta domo dependas de tio, ke la afero ricevu klarigon. La gardisto malfermis al li la budon kaj levis lin ĝis sur la torfoj; tie Traf ĉirkaŭkuris kaj faris spektaklon kiel tuta bando da hundoj, ĝis fine kvindeko da torfoj ekruliĝis. La hundo falis kun la torfoj kontraŭ la kruroj de la gardisto kaj ĉi lasta diris : „Nu, venu Traf, ne tiom ekscitiĝu pro tiuj stultaj ratoj!”

Sed kiam Traf meznokte kun laŭtega bojado saltis el sia korbo,

de la planko sur seĝon kaj de tie al la fenestro, la afero kolerigis la gardiston kaj li ĵetis pantoflon al Traf kaj insultis lin.

Traf malbonhumoris la tutan sekvintan tagon, ne trinkis la lakton, ne iris renkonte al sia mastro kaj ne bojis, nek vostosvingis, kiam li ricevis permeson kuniri al la arbaro. Por repacigi lin, la mastro mortpafis por li sciuron, sed anstataŭ preni ĝin kaj formanĝi kun karno kaj ostoj, li apenaŭ priflaris ĝin kaj eĉ lasis ĝin netuŝita.

La gardisto skuis la kapon, ridis kaj poste diris hejme : „La hundo ankoraŭ koleras, pro tio, ke mi ĵetis, pantoflon al lia kapo.” Sed Traf pro tio ne tiom koleris, kiom pro la malafabla trakto kaj super ĉio la esprimo „stultkapulo” lin forte ofendis. Kaj je la vespermanĝo li ankoraŭ ne vostosvingis, kiam ili ĵetis kolbashaŭton al li kaj daŭris kvin minutojn antaŭ ol li bonvolis formanĝi ĝin.

Fakte li estis pli ĉagrena ol kolera. Ĉu estas eble, ke la homoj manĝas, trinkas kaj ridas, dum ekstere estas fantomoj ? Kiu povas scii, ĉu tiu terura kreitaĵo ĉinokte ne jam ŝteliros en la domon kaj kaŭzos ian malfeliĉon. Kaj pro tio Traf sekrete iris eksteren kaj restis tie la tutan nokton, malgraŭ la fajfado de la ĉasgardisto.

Sed nenion li trovis kaj matene li honteme envenis la domon, rampis sub la fornok kaj montris sin nur, kiam estis tempo por manĝi.

Sed finfine li ricevis brilan pravigon. La servisto envenis kaj diris : „Ni havas la unuan neĝon, mastro, kaj mi kredas, ke Traf sola estis pli saĝa ol ni ĉiuj kune. De la porkejo al la torfobudo estas nome la postsignoj de putoro. Kaj nun mi ankaŭ komprenas, de kio devenis la aĉa odoro matene en la korto. Mi opinias, ke ni povos plezurigi la hundon, se ni faros bruegon en la korto, ĉar putoro tion ne eltenas. Ankaŭ ĉe mia antaŭa mastro ni faris tion, kaj li staris preta kun pafilo kaj ni irigis la hundojn en la stalojn kaj ni bruadis per kaseroloj kaj patoj, kaj tiam la putoro forsaltis kaj li estis ĉu pafata, ĉu mordata de la hundoj.”

La ĉasgardisto diris ridante : „Nu, ni ankaŭ faru tion.” Kaj tiam komenciĝis la spektaklo. Le servisto kaj Lina kaj eĉ la edzino prenis kaserolojn kaj eniris la porkejon, la gardisto ŝargis sian pafilon kaj ekpostenis kaj Traf estis sendata en la stalon. Sed kiam ili ekbruis, Traf forkuris kaj iris al la torfobudo kaj hurlis tie tiom longe, ĝis kiam la servisto malfermis al li. Kaj tiam li fariĝis sovaĝa, tre sovaĝa, kaj li fosis tiom fervore en la torfoj, ke la gardisto diris : „Jan, disĵetu la torfojn por li.”

Jan faris tion kaj dume Lina klakadis per la kaseroloj. Subite ŝi kriegis, faligis la ujojn, tenis siajn jupojn streĉe ĉirkaŭ la kruroj, kuris kontraŭ la gardiston, tiel ke la pipo falis al li el la buŝo kaj antaŭ ol ili fakte komprenis, kio okazas, io nigra kuregis al la pordo kaj Traf sekvis. Kaj tiam ili aŭdis, ke la mastrino krias : „Brave, Traf, brave! Li havas ĝin, li havas! Bone, Traf, tenu la aĉulon!”

Kiam la gardisto, la servisto, kaj Lina venis en la korton, la afero jam finiĝis. Traf skuis la putoron, kiu ankoraŭ iom movis sin, portis ĝin en la domon kaj metis ĝin sur la aprofelon, kie li ree komencis priflari ĝin, ĝis kiam la gardisto levis la putoron kaj karesis la hundon. „Brave, Traf!”

Nu, tio ne interesis Traf, sed li pensis : „Vi povis ŝpari al mi multan koleron kaj multan ĉagrenon, se vi pli frue ekpensus, ke mi ĉiam pravus, kiam mi ekscitiĝas. Sed, ho ve, vi malhavas bonan nazon kaj pro tio mi devas pardoni vin!”

(Hermann Löns.)

El la holanda : VANE.

### LA ALTVOLORA SKATOLO.

En banloko, multe vizitata de riĉaj fremduloj, loĝis kuracisto, kiu estis ege kompetenta.

Unu el liaj pacientoj estis riĉega grafo. La nobelo estis dum tri monatoj danĝere malsana, sed tute resaniĝis dank' al la lerteco de la doktoro.

Iun tagon la grafo vizitis lin kaj diris : „Sinjoro doktoro, morgaŭ mi foriros de ĉi tie. Ĉiam mi estos danka pro via nepagebla helpo. Bonvolu akcepti ĉi tiun donacon!”

Dirante tiujn vortojn li metis bele ornamitan skatolon sur la tablon kaj ekstaris por foriri. La kuracisto tamen ne estis kontenta. Li ja delonge esperis ricevi grandan monsumon. Post ioma hezito li diris : „Mi trovas la skatolon tre bela, via grafa moŝto, sed por diri la veron, mi preferus ricevi monon.”

La vizitanto serioze rigardis kaj parolis : „Je via servo, sinjoro doktoro. Kiom mi ŝuldas al vi?”

„Ducent guldenojn.”

La grafo malfermis la skatolon, kiu estis plena de oraj moneroj. Li elprenis dudek monerojn, donis ilin al la kuracisto, metis la skatolon en sian poŝon kaj foriris.

## SE MI ESTUS INSTRUISTINO.

Inter la bariltabuloj de l' lernejo-korto  
Mi rigardas soldataron kiele ĝi marŝas : —

Butonoj, brilaj, flavaj, en la sun' radias;  
Muzikas trumpetoj, flavaj, brilaj, kurb-liniaj :  
Tondras la tambur' kaj flavaj sono-diskoj.  
Paŝas for la bando. — Sur la blanka ĉevalo jen, la oficiro.

Hej, se estus permesate grimpi sur barilon !  
Facile estas ja al fraŭlino instruistino :  
Ŝi venas pli frue ol kutime,  
Ekstaras alte sur lernejŝtupar — kaj vidas ĉion.

Ŝi frue venas por malhelpi, ke mi rigardu bandon.  
Kaj se mi estus instruistin' — mi lasus la infanojn iri  
[antaŭ la lernejo-domon :  
— Rigardu, idoj! Kaj poste vi eksidos ronde  
Kaj ĉiu rakontos kion li vidis.

Sed nia instruistin', ho jes! Ŝi nur de supre diras :  
Ek! Al la klaso! — La unua kiu aŭdas, ekkrias laŭte :  
Al klas'! Al klaso! Kaj tuj ni ĉiuj kuras  
Kvazaŭ nin miel' atendus, kaj ne la kalkulado.

Ĉiuj ja pli bone fartus.  
Se estus mi instruistin'.

El : „La tagoj de l' infaneco”, de D. TADIJANOVIĆ,  
Zagreb (Kroatujo), Jugoslavio.

Trad. : J. VELEBIT.

---

Deklamu la simplajn versojn el „L. J. V.” en viaj grup- kaj festvesperoj.


# ENIGMOJ

Kun **d** mi estas konstruaĵo.

- » **p** » » frukto.
- » **k** » » interpunkcia signo.
- » **r** » » itala urbo.
- » **n** » » ĉe kelkaj tre fama.

A'dam (Ned.).

G. FRANSEN.



a, i, i, i, k, k, l, l,  
n, m, o, o, o, o, o.  
La vortoj signifas,  
horizontale kaj ver-  
tikale: 1. karan ho-  
mon; 2. numeralon;  
3. instrumenton; 4.  
silabon; 5. vokalon.

T. Sv. MARTIN (Ĉ.S.R.). D. VOJO.

## LA SOLVOJ EL No 5.

Lundo-ulno-dogo-onklo-valso-inko-kafo-orfo. La antaŭnomo estas Ludoviko.

Lampo-ankro-julio-usono-nesto-abelo-vespo-ibiso-vermo-onklo. La konata nomo estas „La Juna Vivo”. Bedaŭrinde mankis en la dua enigmo la 5a klarigo, tio malfaciligis la solvodon. Premion gajnis : S.ro Arpomaa, Patäjärvi (Finl.) kaj F.ino M. Lepinte, Dijon (Franc.).

## EL „BRITA ESPERANTISTO”, NOVEMBRO 1937.

„La Juna Vivo”, 1936-1937, 176 pp. — Jen la tria jarkolekto en unu plaĉa volumo de ĉi tiu „Monata Organo por la Junularo kaj Komencantoj”. Malgraŭ multaj malfacilaĵoj ĝi regule aperadas, kaj trovas ĉiam pli grandan ŝaton ĉe la esperanto junularo kaj ĉe instruistoj kaj kursgvidantoj — eĉ lernantoj plenaĝaj trovas ĝin interesa. Ĝi liveras utilan provizon da simpla kaj bona legaĵo, kun facilaj lecionoj, bildoj, kantoj, k. s.

Al ĉiu Esperantista biblioteko ni rekomendas la aĉeton de la nuna kaj la du antaŭaj volumoj, kaj al ĉiu kursestro regulan abonon al la gazeto...

## „LA JUNA VIVO”-JARKOLEKTOJ EN ĈIES LIBRO-ŜRANKO.

Por ŝtopi la breĉon en „La Juna Vivo”-kaso, ni liveras dum la monatoj decembro kaj januaro la jarkolektojn je tre malalta prezo!

1-a bindita jarkolekto...	0,75 guld.
2-a bindita jarkolekto...	0,75 guld.
3-a bindita jarkolekto...	0,75 guld.
Internacia kantaro .....	0,35 guld.

sume 2,60 guld.

## DUM DECEMBRO KAJ JANUARO

oni pagas por la kvar belaj  
libroj kune, nur

**1,75 guld.**

(eksterlande, 2,00 guld.)

## SUBTENU LA INTERNACIAN JUNULARLABORON.

## HIMNO.

Trankvile.

1 = C 5 5 . 5 6 5 . 4 | 5 . 3 . |  
 Fra - toj, al sun' li - ber - e - co,

C F C F a  
 Fratoj, nun supren al lum'! Hel' el mallum' estin -

e d G C  
 5 . 3 3 . | 4 2 . 1 7 6 . 7 | : : i . . . 0 0 0 |  
 te - co, Bri - las es - tonto nin nun!

Vidu la frataj milionoj  
 Venas el nokto al ni  
 Ĝis la sopir' de legioj  
 Turnos la sorton de ni.

Donu la manon nun frato,  
 Moku pri morto kaj fal';  
 For la sklavec' kaj malsato,  
 Sankta la lasta batal'!

\*) El : Internacia Kantaro „La Juna Vivo”.

Prezo : 0,35 gld. aŭ tri respondkup.

„LA NORDA STELO” festos la 5-jaran jubileon je la 20a de februaro en Schagen. Malgraŭ relegia kaj politika diverseco vere Zamenhofa amikeco estas karakteriza trajto de la kunvenoj. Antaŭtagmeze estas laborkunsido kaj posttagmeze amuza programo. Ĉiuj interesiĝantoj petu, antaŭ la 15a de februaro, senpagan programon al la sekretario, Joh. Mandemaker, Asterstraat 3, Alkmaar.

Por komencantoj.

### LA URBOBANEJO.

La urbeto Torda \* jam delonge havis banejon. Sed dum ĝia konstruado oni ankoraŭ ne uzis cementon, kaj pro tio oni devis kovri per kverkaj tabuloj la plankon de la banejo.

Pro senĉesa uzado de la banejo, kaj eĉ pli pro ĝia purigado, la tabuloj difektiĝis kaj sur unu elstariĝis najlo kaj tiel minacis la piedojn de la bangastoj.

La inspektisto de la banejo tute korekte raportis pri tio ĉe la urbestraro, postulante forigi la malagrabraĵon. La urba konsilantaro longe diskutis pri tio, kiel oni ordigu la aferon, sed la diskutoj restis senrezultaj. Finfine levigis unu el la delegitoj kaj faris jenan proponon : „Najlon, kiu el tabulo elstaras, oni devas per pikildrato ĉirkaŭi, por ke la gastoj ne surpikiĝu.”

Oni diras, ke la propono estis unuanime akceptita.

**Respondu al jenaj demandoj :** Kion havis la urbeto Torda? Ĉu ĝi jam delonge havis banejon? El kio konsistis la planko? Ĉu la banejo estis ofte uzata? Ĉu oni ankaŭ purigis la banejon? Kio elstaris el la planko? Kiujn minacis la najlo? Ĉu oni raportis pri tio ĉe la urbestraro? Kiu raportis tion? Kia estis la raporto? Kion postulis la inspektisto? Ĉu la urba estraro diskutis pri la afero? Kiaj estis la rezultoj? Kiu fine havis proponon? Kion proponis la delegito? Ĉu oni akceptis la proponon?

### LA STRATNOMOJ.

Kiam ekregis la kutimo, ke oni nomu la stratojn de urboj kaj de urbetoj, tiam oni ankaŭ en Torda kunvenigis la urban konsilantaron, por decidi kiajn kaj kiujn nomojn oni donu al la stratoj.

Ĉio glate pasis, ĉar la urbo posedis sufiĉe da meritoplenaj nomoj de siaj patroj-senatoroj. Kiam tiuj elĉerpiĝis, restis ankoraŭ la ŝoseo, kondukanta al Kološvar, ĝi ankoraŭ ne havis nomon. La konsilantaro longe kaj akre debatis, sed tamen ne povis interkonsenti per kiu nomo oni baptu la ŝoseon, kaj oni prokrastis la diskuton ĝis la venonta tago.

Dum la dua kunsido iu komitatano proponis, ke la nomo de la ŝoseo estu : „Tie ĉi komenciĝas la fino de la kološvara vojo”.

Ankaŭ tiu ĉi propono estis unuvoĉe aprobata.

Zagreb (Jugosl.).

Josip VELEBIT.

(Rakontu la enhavon per propraj vortoj.)

\* Torda estas urbo en Rumanio.



## ORIENTA JUGDECIDO.

Laboristo grimpis sur tegmenton por ripari kamentubon. Li tamen falis de la tegmento kaj ĝuste trafis sinjoron, kiu promenis sur la trotuaro. La sinjoro mortis surloke kaj la laboristo mirakle restis absolute sendifekta.

La filo de la mortinto plendis ĉe la juĝisto kaj postulis, ke li punu la laboriston. La juĝisto tamen opiniis, ke la laboristo estas senkulpa. Sed la plendinto ne estis kontenta kaj diris : „Sinjoro juĝisto, la viro meritas punon, li ja mortigis mian patron! Li do estas la kaŭzo, ke mia patro ne plu vivas.”

La juĝisto pripensis momenton kaj respondis : „Nu, mi permesas, ke vi traktu lin sammaniere. Mi ordonos ke li staru sur la sama loko, kie troviĝis via patro. Vi grimpos sur la tegmenton, faligos vin kaj klopodos mortigi lin.”

La filo levis la ŝultrojn kaj foriris.

## OFICIRO KAJ FORĜISTO.

Oficiro, kiu estis eksterordinare forta, haltis antaŭ forĝejo por hufferigi sian ĉevalon. La forĝisto prenis hufferon kaj tenis ĝin kontraŭ hufo de la ĉevalo por vidi, ĉu ĝi taŭgas. Poste li volis meti ĝin en la fajron.

La oficiro : „Permesu al mi vidi, ĉu ĝi taŭgas.”

La forĝisto transdonis la feron. La oficiro zorge inspektis ĝin kaj diris : „Ĝi ne estas sufiĉe forta. Vidu nur.” Kaj sen multe da peno li kurbigis ĝin. La forĝisto diris nenion kaj montris alian feron. „Bone, submetu ĉi tiun”, diris la kliento.

Kiam la forĝisto estis preta, li ricevis arĝentan moneron. Li inspektis ĝin kaj diris : „Ne, sinjoro, tiu monero estas el plumbo!” Kaj tre facile li kurbigis ĝin. La oficiro ridetis kaj respondis : „Vere, vi superas min. Jen, ora monero!”

## LA HUMORISTO.

S.ro A. renkontas sian amikon kaj diras al li : „Kiom malbonhumora vi aspektas! Ĉu okazis malagrablo al vi?”

„Ĉu vi ne scias, ke laŭprofesio mi estas humoristo? Kaj hodiaŭ mi havas liberan tagon!”

(Rakontu la enhavon de la supraj rakontetoj per propraj vortoj.)

## VERKAJOJ DE NIAJ JUNAJ LEGANTOJ

### Arĝenta Belo.

Estas brila lunluma nokto. La luno, kiu estas preskaŭ plena, leviĝas pli kaj pli alten; ĝiaj brilaj radioj saturas la sonĝantajn arbaretojn per mistera arĝenta lumo. La arĝenta rivereto ekbrilas, kaj dancas trans la arĝentaj ŝtonetoj. Kelkfoje fiŝoj leviĝas al la surfaco, arĝentaj strioj, kiuj rapide malaperas sub la radikojn de la super-pendantaj arboj.

Sur la bordoj de la rivereto la lekantetoj dormas, atendante la varman sunon, kiu maldormigos ilin. Tiam ili disfaldos siajn arĝentajn vestojn por honori ĝian oran majeston.

La pluvo estas arĝenta dum la nokto, kaj arĝenta estas la nebulo, kiu tuŝetas la herbojn kaj restas inter la branĉoj de la arboj; arĝenta estas la frosto, kiu estas sur heĝoj.

Leontodoj nur estas arĝentaj, se ili estas maljunaj, sed kian eleganton tiuj arĝentaj fadenoj donas al la oraj kapoj.

La pendantaj folioj de la tremolo estas arĝentaj en la velkanta lumo de ĉi tiuj mallongaj posttagmezoj, kaj arĝentaj estas la flugiloj de la noktpapilioj, kiuj flugetas simile al fantomoj en la arbarvojoj. Eĉ la mallarĝaj kapoj de la herboj ŝajnas esti arĝentaj kontraŭ la pala sunlumo.

Estas multe da belo en la naturo en ĉiuj sezonoj kaj multe da tiu belo estas arĝenta, speciale kiam la Reĝo Vintro venas kun sia kortego en la kampojn kaj arbarojn.

Birmingham (Anglujo).

Trad. el la „Weekly Post”,  
Sylvia NORTH.

### GNAFALIO (pola fabelo).

Jam antaŭ longe, tiom longe, ke neniu el la vivantaj tion memoras, en Zakopane, sur flanko de unu el la montoj en domaĉeto el branĉoj, vivis Runsĭaj, malgranda montaranino. Ŝi similis neniun el la knabinoj, vizaĝeton ŝi havis blanketan, kiel lakto de ŝafoj, harojn helajn kiel oro kaj okulojn ĉiel-blujajn. Bone estis al la infaneto inter siaj kunuloj. Ŝi kantis dum tutaj tagoj kaj la rido preskaŭ neniam malaperis de ŝia buŝo. Sed venis la mizera momento, kiam mortis la patrino de la knabino. La paĉjo ofte delikate premis ŝin al sia brusto, lavis kaj kombis ŝin, kiel tion panjo faris, sed tamen estis tre malĝoje al la knabino.

lutage la patro iris ien kaj — ne plu revenis. La knabineto aŭdis, ke oni diris : „Li persekutis rok-kapron kaj falis en abismon.” La homoj aldonis, ke estas bone al li tiel, ĉar li estas kun sia edzino. Do ŝia malgranda koreto frapis pro ĝojo je la penso, ke estas bone al ili ambaŭ, kaj ŝi eĉ ne trankviliĝis pri li.

Kiam la montaranoj eniris la valojn por serĉi laboron, ŝi restis sola inter la teruraj montoj. Ŝi ploris longe, tre longe, kaj fine ŝi ekdormis, alpremite al flanko de roko.

Iu vidis la knabineton, enportis ŝin en domaĉeton, donis panon de aveno kaj varman lakton por trinki kaj provis restigi ŝin sub la tegmento, sed vane. Ŝajnis al la infaneto, ke inter la ŝtonegoj, kie dormas ŝia patro, estos pli bone.

Si migris de domaĉo al domaĉo kaj la homoj nomis ŝin la orfo, kaj helpis ŝin, kiom ili povis. Poste iu ŝanĝis ŝian nomon, pro la griza montarana pelteto, kiun ŝi portis sur ŝiaj brakoj, oni diris al ŝi : „Gnafalio”. Sed la infaneto efektive mizeriĝis pli kaj pli. Ŝia vizaĝeto paliĝis, estis blanka kiel la neĝo sur la montoj, kaj nur la oraj haroj lumis kiel la radioj de la suno. Foje iu fidela montarano, unu el tiuj, kiuj nutris la orfeton, rimarkis, ke de longa tempo neniu vidis ŝin proksime. Oni komencis serĉi ŝin en domaĉetoj, sur vojoj k. t. p. Sed vane, oni ne trovis ian signon. Nur en loko, kie plej ofte estis la knabineto, ĉe la piedo de per neĝo kovrita monto, oni vidis ian eksterordinaran objekton. El sub la neĝomantelo aspektis malĝoja, sed bela floro. Kapon kaj foliojn ĝi havis kvazaŭ el blanka veluro aŭ feleto, en tiu momento brilanta per arĝenta stelo de prujno. La montaranoj malkovris la kapojn. Ili komprenis, ke sinjoro Dio plifaciligis ŝian sorton, prenis ŝin kaj aliformis en floron. Kaj tial homoj nomis ŝin „gnafolio”.

Szamotuly (Polujo). Trad. Alojzy WENCLEWSKI, gimnaziano.

### LA ĈIAMA SKOTO.

Societo da angloj vizitas groton en Skotlando. La gvidisto rakontas kaj unu el la vizitantoj demandas : „Diru, ĉu tiu ĉi groto ĉiam ekzistis?”

„Fakte ne,” respondis la gvidanto. „Antaŭe ĝi estis kuniklo-kaverno!”

??????

„Vi sciu, ke iam skoto faligis en ĝin pencon!”

Edinburg (Skotlando).

Agnes ASH.

## LA KATO PRIZORGIS SIAN NESTON.

Posedanto de manufakturejo en Hago lastatempe rimarkis la mankon de diversaj tolaĵoj el sia butikiko, jen robeto aŭ jupeto, jen teksaĵo. Plena problemo por la butikisto estis, kie ĉi tiuj varoj restis. Ĉar li opiniis, ke ŝtelo estas la kaŭzo, li sciigis tion al la polico. Kiam poste kelkaj policianoj esploris la aferon, ili faris rimarkindan kaj interesan malkovron.

En la ĝardeno malantaŭ la butikiko la policianoj trovis maldikajn fadenojn. La samaj troviĝis ankaŭ sur tabula barilo kaj sekvinte ĉi tiun postsignon ili malkaŝis je sia surprizo la perditajn ŝtofojn en senhoma dometo. Tie kuŝis meze de amaso da tolaĵo kelkaj katidoj. La katino trenis la varojn ĉi tien por fari el ili varman neston.

Estis certe malagrabla al ĝi, ke la policianoj disigis la zorge konstruitan liton kaj reportis la trovitaĵojn al la vera posedanto.

JOMOTO.



## SKRIBA KURSO DE LA JUNA VIVO

La redakcio estas tre kontenta pri la rezultatoj de la komenckurso. La kursanoj preskaŭ senescepte studas fervore kaj kontentige progresas. Kelkaj jam finis la komenckurson kaj abonis la daŭrigkurson. La daŭrigkurso konsistas el 16 lecionoj. La partoprenantoj ricevas kiel studmaterialon la trian jarkolekton de „La Juna Vivo”. La redakcio holandlingve klarigas la lecionojn. La prezo de la dua kurso estas 1,20 guld., enkalkulita la prezo de la libro. Oni rajtas pagi en du partoj. Ankaŭ tiuj, kiuj ne trastudis la komenckurson, povas partopreni en la daŭrigkurso. Kiel enkonduko en tiu kurso povas servi resumo de la gramatiko de la komenckurso.

Kiel ni jam diris en la antaŭa numero de la gazeto, la redakcio ne fiksis daton ĝis kiam oni povas komenci la studadon. Ni daŭre akceptas novajn kursanojn.

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace jarabonon aŭ jarkolekton de „La Juna Vivo”.



# INTERNACIA JUNULARKUNVENO

Se la antaŭsignoj ne trompas, la somerkunveno en Groet fariĝos sukceso. De diversaj flankoj venas informpetoj kaj verŝajne venos almenaŭ 70 eksterlandaj gejunuloj. Pri tio ni ĝojas, sed samtempe ni sentas grandan respondecon. Ni fiksas la kostojn por eksterlandanoj je po 3,50 guld. Ili ja havas grandajn elspezojn por atingi Nederlando. Sed kompreneble por 3,50 guld. ni ne povas gastigi la partoprenontojn. Ni do devas zorgi pri...

Ni fidus, ke ĉiu esperantisto kun ĝojo sciigis pri la plano kaj laŭeble subtenos ĉi tiun entreprenon. Ni do afable petas personojn aŭ grupojn, kiuj finance povas helpi, sendi sian donacon al la red. de „La Juna Vivo”. La redakcio raportos pri tio en la gazeto.

Due ni disponigis duonpaĝon de „La Juna Vivo” por anoncoj. La enspezoj de tiuj anoncoj estas por la kaso.

Trie ni vendas belajn Esperanto-propagandajn kartojn, ilustritajn, kaj la profito estas por la sama celo. La vendprezo de tiuj kartoj estas po 5 cendoj. Ni esperas, ke multaj pretas helpi en tiu vendado.

## 1-a LISTO DA PARTOPRENONTOJ EN LA JUNULARKUNVENO EN GROET.

### Anglaj knabinoj, sub la gvidado de F.ino Shephard :

NOMO	Aĝo	ADRESO
Margaret Belcher	13	144, Elmdale Crescent, Northfield Birmingham.
Olive Farrell	13	35, Kelby Rd. » »
Violet Foster	11	1, Norrington Rd. » »
Margaret Hadley	12	24, Tudbwy Rd. » »
Jacqueline Morrel	11	24, Tinkers Farm Rd. » »
Christine Lucas	13	23, Allens Farm Rd. » »
Joan Smith	13	2, Bidford Rd. » »
Irne Smith	13	127, Elmdale Crescent » »
Maru Dutton	12	17, Tudbwy Rd. » »
Marion Tames	13	29, Tinkers Farm Grove » »
Elsie Adams	11	19, Chesterton Rd. » »
Enid Plant	13	7, Torre Avenue » »
Kathleen Mundy	12	48, Norrington Rd. » »

### Francaj knabinoj, sub la gvidado de F.ino Lepachelet :

M. Louise Stien (15 jara), Andrée Guislain (13), M. A. Beauvois (13), Eliette Crudenaire (13), Renée Leclercq (14), Jeanne Lecomte (14), Lucienne Bot (13), Germaine Dussart (12), Ginette Bernard (13), Henriette Tison (14), Georgette Dutto (13), Augeh Carre (13), Rose Cambiez (14), Renée Capliez (15), Fernande Dubois (14), Lucette Lesieur (13).

**Nederlandaj knaboj :** W. v. Veenendaal (14), K. de Haan (14), W. v. d. Hoff (14), ĉiuj en West-Grafdijk (N. H.).

**Nederlandaj knabinoj :** Guus Bankersen (14), Jenneke v. Veenendaal (17), ambaŭ en West-Grafdijk (N. H.); Corrie de Leeuw, 't Zand (N. H.); Lida Lankelma (17), Looiersplein, Purmerend; Femmie Bijlsma, Watergang, post Ipendam.

Ciuj infanoj deziras korespondi kun alilandaj partoprenontoj.

Kiu deziras korespondi kun unu el la francaj knabinoj skribu al F.ino Lepachelet, 13, place Victor Hugo, Somain (Nord).

Ankoraŭ anoncis sin 3 anglaj grupoj. En la venonta numero aperos dua listo.



## RICEVITAJ ESPERANTAJOJ

**KOMUNA KANTLIBRO**, red. de H. W. kaj N. Holmes, eld. de The Esp. Publishing Co, Londono. Prezo 1 ŝil., afranko 1 p. Mendebla ankaŭ ĉe „La Juna Vivo”. Tre bona kantaro, enhavanta la tekstojn de 36 kantoj. Ne por ĉiuj kantoj la libreto enhavas la muzikon. Tamen la notojn, kiuj ne troviĝas en la kantaro oni povas aparte mendi ĉe iliaj eldonintoj.

**AVENTUROJ DE ANTONIO: F. Omelka**. Eld. de Malkaraj libroj, Brno, Ĉ.S.R. 60 pĝ., 12 × 16 cm., ilustrita. Prezo 5.50 Kč. Originala verketo pri la aventuroj de knabo el Moravio en Italio, Tunizo kaj Saharo.

**NOVAJ GUIDFOLIOJ**. Dum la lastaj monatoj ni ricevis plurajn (fald)prospektojn pri diversaj landoj kaj urboj. Belaspektaj, riĉe ilustritaj.

**Xa SOKOL-OLIMPIADO, Praha 1938**, pri la festoj de la Ĉeĥoslovaka Gimnastika Asocio SOKOL, okazontaj en julio '38. Senpage ricevebla ĉe : Ĉeĥoslovaka Esp. Informejo, Praha XIX, Uralské, 9.

**Aŭstrio**, tre bela 40-paĝa libreto, klara fervojlinia karto. Eld. Aŭstria Fremdultrafiko, Nibelungengasse 4, Wien I.

**Ĉeĥoslovakujo**. 12-paĝa, grandformata. Havebla ĉe la Ministerio de Komercio, Turisma sekcio. Praha I.

**Vieno**. Bela faldfolio. Eld. Fremduloficejo de Wien, Mariahilferstr. 2, Messelpallast, Wien VII.

**Rio de Janeiro**. Grandformata, 30-paĝa, aperis okaze de la 9-a brazila esp.-kongreso. Eld. la Ministrejo por Eksterlandaj Aferoj. Mend. ĉe Braz. Esp. Ligo, Avenida Marechal Florina 212, Rio de Janeiro.

**Karisbad**. 8-obla faldfolio pri la mondfama ĉeĥa kuracbanloko.

**Varsovio, Vilno, Krakovo, Gdynia**. Pri ĉi urboj la ligo por Protekto de Turismo, str. Mokotowska 61, Varsovio eldonis 4 belajn, grandformatajn faldfoliojn.

**Eŭkaristia Mondkongreso**. Petu la faldfolion kaj informojn pri la kongreso de la Subkomitato, Petöfi Sandoructa 9.1.3, Budapest IV.

**Tra-Siberia Ekspreso**, eld. de la ĝenerala direkto de la Sud-Manĉuria Fervoja Kompanio.

**Ek al Manĉoŭkŭo**. 26-paĝa libreto pri la azia lando. Eld. de Ĝenerala Direkto de Fervojoj Sudmanĉuria Fervoja Kompanio (S.M.P.) en Mukden, ĉe kiu ĝi estas senpage havebla.

**La Fermo de la Suda Maro**. Belega, riĉe ilustr. libreto. Eld. Int. Cseh Instituto. Prezo 0,10 guld., aŭ unu resp. kupono.

**Svislando en la Neĝo**. 16-paĝa. Senpage akirebla ĉe Svisa Turisma Centralo, Zürich, Bahnhofplatz 9, Svisujo.

**Viipuri**, 16 paĝa. Senpage akirebla ĉe Hannes Koivu, Pellervonkatu 10, B 12, Viipuri, Finnlando.

# KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol 2 linioj.

**Ceĥoslovakujo** : S.ro Jan Hargaš, instruisto, Ĉiz, dez. kor. kaj interŝ. pm. kun ĉiuj (precipe malproksimaj) landoj. Respondo certa.

**Danujo** : 4 fraŭloj dez. kor. kaj interŝ. il. gaz. kun la tuta mondo (ne kolektas pm.). Skribu al : Niels Sørensen, Thyregod. Resp. certa.

**Danujo** : 10 geknaboj, 12-15 jaraj dez. korespondi. Adreso : Elin Petersen, Vestergade 34, Stubbekøbing.

**Danujo** : S.ro Emmar Nielsen, Wedellsborg Mejeri, pr. Ejby (21-jara laktovendisto) dez. korespondi kun ĉiuj. Respondo garantiita.

**Franco** : Instruistoj kaj legantoj de ĉi tu gazeto, bonvolu sendi al mi desegnaĵojn por lerneja ekspozicio. Mi resp. laŭdezire per esp. libreto pri Lyon, aŭ desegnaĵo. F.ino Y. Vallon, 80 Avenue de Save, Lyon.

**Nederlando** : F.ino E. Cohen, Instruistino, Emmen (Dr.) dez. korespondi.

**Nederlando** : Volonte mi volas korespondi kun geknaboj (prefere knabinoj). Adreso F.ino T. Bloem, O. Knollendam (N. H.).

**Nederlando** : S.ro W. Hanneman, Paneschneiderstraat, 13, Bleyerheide Kerkrade (L.), dez. kor. per il. poŝtk. kun tutmondaj gesamideanoj. Resp. certa.

**Nederlando** : Popollerneja instruisto volonte koresp. letere kaj bildkarte kun eksterlandanoj. J. M. Toorneman, Diepenveenseweg 169, Deventer.

**Nederlando** : C. H. v. Kuilenburg, Fonteinstraat 2, Leerdam, dez. kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj.

**Nederlando** : F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, deziras korespondi kun vitristoj kaj ceramikistoj.

**Nederlando** : 19-jara F.ino volonte volas korespondi kun eksterlandaj gemikoj aŭ nederlandanoj. Certa resp. Gr. Gruyter, Hoflaan 2, Bergen (N. H.).

**Nederlando** : Junulo dez. kor. kun gesamideanoj tutmondaj. Respondo certa. L. Palmen, Oudeschachtstraat 2, Kerkrade.

**Nederlando** : J. S. Loof, Tholenstraat 11, Ter Neuzen, laboristo, dez. kor. kun gesamideanoj de la tuta mondo per let., interŝ. pm. Resp. certa.

**Nederlanda** : 14-jara knabo deziras korespondi kaj interŝangi poŝtmarkojn kaj glumarkojn. A. van Hengel, Banningstraat 80, Soesterberg.

**Nederlando** : Zamenhofmonumento. Al ĉiu kiu sendas al mi apartan il. poŝtk. aŭ leteron, mi tuj sendos **senpage** la plej novan bildon de la Zamenhofmonumento en Bergen-op-Zoom. J. Dercks, Antwerpschestraat 43, Bergen-op-Zoom. Bonvolu skribi el multaj landoj!

**Polujo** : Prof. Maske serĉas junajn gekorespondantojn por gimnazia Esp. Rondo (P. M. P. I., L.). Resp. certa. Szamotuly, Rynek 47.

**Nederlando** : Esp. grupo dez. kor. kun gesamideanoj (16-50 jaraj) el ĉiuj landoj. Adr. F.ino A. Swart, Beets (N. H.).

**Nederlando** : S.ro H. Hubers, Boompjes 28 (achter) Almelo, sendos al ĉiuj, kiuj sendas 100 malsamajn pm., saman kvanton.

**Nederlando** : La infangrupo „La Verdaj Pigoj”, Gouda, aranĝos let.-vesperon. Certa resp. P. Becker, Winterdijk 15a, Gouda.

## ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio)

**SCIENCA GAZETO** anoncas la 7-an jaron de sia apero. Du novaj rubrikoj, ĵus aldonitaj : „Etnografa Fakto” kaj „Lingvistika Fakto”. Jarabono nur 1,50 guld. Abonebla ĉe „L. J. V.”. Petu specimenon (prezo 5 c.).

**I. K. U. E. JUBILEA KONGRESO** okazos de 23-28. VVI, 1938 en Ljubljana, en Jugoslavio. Ĉiujn informojn donas : Damjen Vahen, L.K.K.-sekretario, Reslova 29, Ljubljana (por aparta resp. oni aldonu int. poŝtrespondkuponon).

**LITERATURA MONDO.** Tutjara kolekto de „L. M.” egalas pli ol mil ilustritajn libropagojn. Jarabono 4,50 guld. Specimeno 0,20 guld. En „Lingvo Libro”, kvaronjara aldono al „L. M.”, vi trovas la plej detalajn libro-kritikojn. Aparte aĉetebla ĉe „L. J. V.”. Specimeno kostas 0,10 guld.

„**INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO**”, la oficiala organo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (T.A.G.E.). Al tiuj gekolegoj, kiuj studis E-ton kaj interesiĝas pri : eksterl. lernejoj kaj instruo, kontakto kun gekolegoj diverslandaj, enkonduko de Esp. en la lernejo tutmonda, ni rekomendas abonon je „Internacia Pedagogia Revuo” ! Petu informojn al : P. Korte, Schoolstraat 13, VEENDAM Nederlando.

**30a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO en LONDONO.** Ĝis 10-12-'37 aliĝis al la kongreso 409 personoj el 22 landoj. Oni presis belajn kongresajn glumarkojn. Prezo por 50, 5 pencoj aŭ 2 internaciaj respondkuponoj. Sekretario : C. C. Goldsmith, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

**BILDO D.ro ZAMENHOF**, formato 36×28,5 cm., tre bela, prezo 0,60 guld. prezo de poŝtkartformato 0,06 guld. Mendeblaj al „L. J. V.”, West-Graftdijk.

„**VAN STRAATEN'S BEKNOPT WOORDENBOEK**” (nur por nederlandanoj), 716 kolonoj, tre klare presita, prezo nur 2,25 guld.

## FAVORA OFERTO POR NIAJ LEGANTOJ

(25% rabato. Ĉu vi jam mendis?)

### Rembrandt, la Magiisto

de M. MULLER

(Konservanto de la Rembr. Muzeo)

Belega, bonstila, romantika verko, enhavanta 100 ilustraĵojn, pri la vivo kaj verkoj de la mondkonata nederl. artisto.

**NENIAM REVENONTA OKAZO !**

Ordinara prezo 2,50 ned. guld.,

nun por niaj legantoj :

Eksterlande : **1,90 guld.**

Enlande : **1,80 guld.**

Mendebla ĉe : Red. „La Juna Vivo”,  
West-Graftdijk, Nederlando.

## SENPAGE

dum 4 monatoj ni liveros al ĉiu nova abonanto la plej interesan, amuzan kaj instruon gazeton en tutmondo

## Verda Revuo

se li pagos tutjaron abonprezon.

Li do pagos 12 numerojn,  
kaj ricevos **16 NUMEROJN.**

La gazeto estas riĉe ilustrita, simple skribita kaj aperas regule ĉiumonate. — Tutjara abonprezo estas **1,50 guld.**

La revuo estas abonebla ĉe la red. de „La Juna Vivo”. Petu specimenon (prezo 5 c.).

Presejo A. Hessens, Bruselo.





## MUUSSES ESPERANTO BIBLIOTEKO

Redakcio : J. GLÜCK, T. JUNG KAJ J. H. J. WILLEMS

La unua serio de la nova biblioteko M.E.B. jam aperis. Kun ĝojo kaj danko la redakcio kaj eldonejo povis konstati, ke M.E.B. vekis intereson, trovis favoran kritikon kaj ĉiam pli kaj pli kreskantan legantaron.

En Oktobro 1937 komencos aperi la dua serio kaj ankaŭ tiu ĉi serio enhavos verketojn originalajn kaj tradukitajn, precipe tiajn, kiuj interesas la esperantiston. Ekzemple, pri historio kaj evoluo de la mondlingva ideo kaj de Esperanto; krome verketojn el diversaj branĉoj de scienco, kulturo, arto, ktp.; noveloj kaj rakontojn tradukitajn kaj originalajn. Eminentaj samideanoj promesis sian kunlaboron.

Ne estas eble citi ĉiujn nomojn, kaj tial ni volas elekti nur kelkajn el la granda nombro, kiuj afable promesis verki por M.E.B. Ili estas:

S.roj generalo L. Bastien, Paris — ĉefred. P. Nylén, Stockholm — J. Baghy, D-ro K. de Kalocsay, Budapest — O. Ginz, R. Hromada, Praha — J. Couteaux, Raymond Schwartz, Paris — Prof. J. Thézard, Niort — F. Wadham, London kaj multaj aliaj.

La redakcio garantias por bonstila Esperanto, kaj la eldonejo zorgos pri inda teknika aranĝo.

ESPERANTO-ELDONEJO

J. MUUSSES — — —

PURMEREND

Giro-numero: 15062

(Nederlando)

## LA ENHAVO DE LA UNUA SERIO:

### No. 1 — J. GLÜCK, LA GRANDAJ FILOZOFOJ KAJ LA UNIVERSALA LINGVO.

En tiu ĉi volumeto nia konata propagandisto pritraktas la grandajn filozofojn (Descartes, Komensky, Leibniz, Dalgarno, Wilkins, Nietzsche k.a.) en ilia rilato al la ideo de universala lingvo. Tial ĝi ankaŭ bonege servas ĉe la propagando, precipe en instruitulaj rondoj.

### No. 2 — M. J. LERMONTOV kaj D. N. MAMIN—SIBIRJAK, RUSAJ NOVELOJ. Tradukis A. Filatov.

Lermontov kaj Mamin—Sibirjak — du elstaraj nomoj en la rusa literaturo. La libreto enhavas po unu novelo de ambaŭ verkistoj. La unua, de Lermontov, el la oficirvivo de malproksima kozaka urbeto, temas pri „fatalisto“; la dua, de Mamin—Sibirjak, estas simpla sed kortuŝa rakonto el la vivo de soleĉa peltocasisito en la alta nordo.

### No. 3 — TEO JUNG, DE MUHEDDIN ĜIS MUNDILATIN. Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj.

Konciza, sed klare kaj interese verkita traktajo pri la historio de la internacia lingvo: pasigrafio, pasilalio, hieroglifoj, ideografio, navigaciaj signoj, decimala klasifiko ktp., pri mondlingvaj projektoj filozofiaj, miksitaj kaj aposterioriaj, „muzika lingvo“, Volapük, Esperanto kaj ĝiaj imitaĵoj, recepto por „eltrovo“ de novaj mondlingvoj ktp. Ĉi tiu volumeto cetere estas bona kompletigo de la unua.

### No. 4 — JOSEPH R. SCHERER, TRA USONO KUN RULIGANTA HEJMO.

Joseph R. Scherer el Los Angeles, kiu famiĝis en la mondo esperantista per sia granda vojaĝo „ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo“, priskribas en tiu ĉi verketo siajn veturadojn per loĝ-aŭtomobilo tra 40 ŝtatoj de Usono. La leganto ekkonas tiun vastan nordamerikan teritorion laŭ tute novaj vidpunktoj. Tre instrua verko en plej konciza formo, Simpla, flua stilo. Interesa prezentmaniero.

### No. 5 — J. GLÜCK, EL LA KLASIKA PERIODO DE ESPERANTO. (Grabowski kaj Kabe).

Grabowski kaj Kabe — la eminentaj pioniroj de Esperanto sur literatura kampo, ambaŭ viroj kiujn Julius Glück, la verkinto de tiu ĉi volumeto, persone konis. Grabowski speciale konata pro la traduko de la granda pola epopeo „Sinjoro Tadeo“, Kabe pro tiu de „La Faraono“. Precipe nia juna verda generacio kun utilo legos tiun ĉi traktajon pri la klasikuloj de Esperanto, sed sendube ĝi interesos ankaŭ la malpli novajn adeptojn de nia afero.

### No. 6/7 — ZAMENHOF, KONGRESPAROLADOJ.

„Ĝis salutinda ideo“ (skribas Jofebo en HEROLDO DE ESPERANTO) „meti en la kolekton de M.E.B. la kongresajn paroladojn de nia majstro. Tiamaniere ili estas facile kaj malmultekoste akireblaj de ĉiu esperantisto — kaj kiu dubas, ke ĉiu samideano kaj samcelano devas ilin koni?“ Aldonita estas la letero de Zamenhof al Bórovko pri la deveno de Esperanto.

No. 8 — **PETÖFI, LA AVO.** El la hungara originalo tradukis Ladislao Spierer.

Petöfi, la plej fama hungara poeto, verkis malmultajn prozaĵojn. El ili ni elektis unu novelon „La avo” por M.E.B. Ĝi estas simpla, iom trankvila kaj tamen kortuŝa rakonto de avo pri la tempo de lia juneco: kiam li amis knabinon, estis forprenito de ŝi de kruela sorto, sed fine tamen retrovis ŝin, kaj ĉio fariĝis bona, dank’ al la potenco kaj justeco de Dio.

No. 9 — **R. B. DE BENGUA, LA JUSNASKITO.** Nekredebla historio. El la hispana originalo tradukis José Fernando Berenguer.

„La jusnaskito” estas rakonto tute malsama ol la antaŭa. Ĝi estas vere „nekredebla historio” pri homo-maljunulo, kiu intencis fariĝi senmorta sed kiu pro iu fatala eraro spertis ion tute neatenditan. Kion li spertis, tion ni ne malkaŝos ĉi tie, por ne anticipi senigi la leganton de la stranga emocio, kiun li sentos sekvante la vivhistorion de la „heroo” de tiu ĉi rakonto.

No. 10 — **LA JUBILEA KONGRESO DE ESPERANTO 1912.**

En la jaro de la Ora Jubileo certe interesas tute speciale la situacio okaze de la Arĝenta Jubileo de nia afero. Oni festis ĝin dum la 8a Universala Kongreso 1912 en Krakovo. La 10a volumeto de M.E.B. enhavas rememoraĵojn kaj oficialajn dokumentojn pri tiu kongreso. Oni konstatas ke multilate la tiama situacio estis simila al la nuna. Kaj la admona devizo „Konkordo!”, tiam donita de la majstro al la esperantistaro, estas nuntempe same aktuala kiel antaŭ 25 jaroj.

### ENHAVO DE LA DUA SERIO:

No. 11 — **PAROLADOJ DE LA ORA JUBILEA KONGRESO.** Elektis kaj aranĝis J. Glück.

No. 12 — **PROF. JOËL THÉZARD, NORDNORDAJ RAKONTOJ.**

No. 13 — **I. SIRJAEV, EN LA VAGONO** kaj aliaj originalaj rakontoj.

No. 14/15 — **LA PROBLEMO DE LA LINGVO INTERNACIA.** Serio da Radioprelegoj de D.ro BJÖRN COLLINDER. Profesoro de finno-ugraj lingvoj en la Universitato de Upsala. Publikigis Paul Nylén.

No. 16 — **GYULA TÖRÖK, ROZINJO.** El la hungara originalo tradukis D.ro K. Kalocsay.

No. 17 — **CHARLES DICKENS, EL LA LONDONA SKIZLIBRO.** El la angla lingvo tradukis Fred Wadham, ĉefredaktoro de British Esperantist.

No. 18—20. En preparo.

Tuta serio de dek volumetoj kostas en abono nur 2.50 ned. guldenojn. Unuopa numero kostas 0.35 ned. guld.

## Kelkaj el la multaj favoraj recencoj:

*Ĉi tiuj verkoj (1.—3.) ampleksas po 32 paĝoj de formato 13 × 19; ili estas tre korekte skribitaj kaj zorge presitaj.*

**Esp. Akademio — Sekcio de Kontrolo.**

*La nova serio distingigas per bonaj preso kaj lingvo kaj estas senrezerve rekomendinda, egale por ĵuslernintoj kiel por jam progresintaj esperantistoj.*

**Aŭstria Esperantisto.**

*La unuaj numeroj de tiu nova serio de malkaraj libretoj estas tre plaĉaj kaj legindaj, kaj se la sekvantaj numeroj estos egale altnivelaj, la entrepreno meritas dankon kaj subtenon.*

**The British Esperantist.**

*Verkita en simpla lingvo, ili povas interesi ĉiun esperantiston.*

**Sennaciulo.**

*Estas imitinde, ke ĉiu verko komencigas per la biografio de la aŭtoro(j). Oni jam antaŭe scias, ke komencas paroli al vi iu, kies vortoj meritas plenan atenton kaj efektive oni jam tuj dediĉas sian plenan atenton al la legotaj paĝoj.*

**Nederlanda Esperantisto**

*La nomoj de la redaktoroj estas garantio por daŭra valoreco de l'enhavo kaj boneco de la lingvo.*

**Jofebo, en Heroldo de Esperanto.**

*Ĉi tiuj libretoj meritas lokon en la libraro de ĉiu esperantisto.*

*Mi volas atentigi pri la granda valoro kiun la libroj havas kiel studiloj en esperantaj studrondoj.*

**Arbeider Esperantisten.**